NEREGULA INFORMILO DE PROVINCA ESPERANTO - FILIO

NUMERO 1 JARO 1997

# ANTAŬEN!

## KUBA ESPERANTO - ASOCIO
## CAMAGUEY

Redaktoro: Edilberto Rodríguez Acán

Kunlaboranto: Jorge L. González Santillán

## ENKONDUKO

Antaú ĉio tutkoran saluton al ĉiuj legantoj de la jus aperinta informilo "Antaúen", omaĝe al la samnoma provinca jurnalo. Tiu ĉi estas la unua oficiala bulteno, do la antaúa estis ja projekto, kiu mi altvaloras kiel grava starto por entrepreni ĉi-taskon. Pro tio, ke mi ne estas sperta redaktoro mi bezonas vian helpon por plibonigi tiun ĉi modestan informilon; vi tion povas fari pere de sugestoj, kritikoj kaj aliaj. Sendu vian leteron al la adreso. Antaúdankon!

La stabo de la Filio de Esperanto en Camagüey estas la jena:

| | |
|---|---|
| Jorge L. González S. | Prezidanto |
| Edilberto R. Acán | Generala Sekretario |
| Domingo Fines | Kasisto |
| Regla Camejo | |
| Osmani Viamontes | |
| Pedro Pimentel | |
| Dayamí Montalvo | |
| Jorge L. del Risco | |

Ili ĉiuj estas je via dispono.

## GRAMATIKO (PRI LA ARTIKOLO LA)

Ĝi estas uzata:

—Kiam ni parolas pri io konata, difinita objekto, aú ni jus parolis pri ĝi.

—Kiam ni parolas pri io kaj komprenas ĉiujn objektojn de tiu speco.

—Kiam la objekto estas nur unu.

—Kiam ni parolas pri tuto de io.

—Antaú la superlativo plej adjektivo.

—Antaú la datoj kaj la horoj.

## PROVERBARO

—Unueco donas forton.
—Gusta kalkulado forigas disputon.
—Kiam nokto vualas, ciuj koloroj egalas.
—Kiam la kato promenas, la musoj festenas.
—Laú la frukto oni arbon ekkonas.

## HUMURO

**100 gradoj**
La instruisto klarigas la funkciadon de la termometro.
—je 100 gradoj la akvo ekbolas.
Petro: Kaj kiel la akvo ekscias, ke estas 100 gradoj?

## Kampara Vivo

La instruisto klarigas al la gelernantoj, kion faras la kamparanoj vintre, printempe, somere kaj aútune.

Poste li demas Petron:
—Nu, Petro, diru al mi, kiam oni kolektas la fruktojn?
—Kiam en la gardeno ne estas hundo, respondis senhezite Petro.

## CU VI SCIAS KE...

—Camagüey estas fama pro giaj krucegoj.

—Camagüey estas la plej granda kaj ebena provinco en Kubo.

—Camagüey havas Iberoamerikan Centron je la dispono de la tutmonda esperantistaro.

## ALIAJOJ

En Camagüey oni konsideras ke:

—Esperanto estas perfekta ponto por la lernado de aliaj lingvoj.
—La sciado de aliaj lingvoj faciligas la lernadon de Esperanto kaj inverse.
—La praktika apliko de propedeútika valoro de Esperanto estas farenda tasko.

**En Camagüey** oni jam inaúguris la lingvan katedron sub la kontrolo de la Provinca Filio en la Iberoamerika Centro. Gi estas vizitata de Kubaj kaj eksterlandaj esperantistoj, car giaj pordoj estas malfermitaj por ciuj anoncitaj vizitantoj.

**PROVINCA FILIO**

Apartado: 5238
Camagüey - 2
C.P.: 70200
Cuba.